

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

30-a Jarkolekto * Septembro 2016 * N-ro 102

ISSN 1576 - 0618



PAYMOGO, densa arbaro inter du landoj

Gazeto Andaluza

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
Vivo de la Asocio	5
Kiel alparoli al eksterteranoj. La komenciĝo de la ekzo-lingvistiko	6
Urso dancas en Fuente Carreteros (Kordovo)	11
Lingva Angulo	13
Poezia Angulo	16
Turismi en Paymogo	17
Paĝoj pri nia Historio	21
Flamenko	25
Andaluza Kuirarto	27
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio	29
Krucvortenigmo	32
Humuro	34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



SEVILO

★ La pasintan 15an de oktobro okazis en Sevilo ĝinkano, kun la partopreno de kelkaj centoj da virinoj kiuj venis ĉefe el Francio, Belgio kaj Britio. Temis pri la ĝinkano “*Pop in the City*”, ĉi-jare sub la nomo “*Pop in Sevilla 2016*”. Dum unu el la plenumindaj taskoj de la partoprenantoj, ĉiuj virinoj, devis ĉeesti rapidan esperanto-kurson, organizata kunlabore kun Sevila Esperanto-Asocio ĉe la municipa kultura centro “*El Pumarejo*”.



Antonio Rodríguez klarigas aferojn pri la internacia lingvo al la partoprenantoj en la ĝinkano.

Entute ĉeestis 228 virinoj, preskaŭ ĉiuj ili franc-parolantoj. La gvidanto de ĉi tiu rapida kurso estis nia sevila amiko Antonio Rodríguez Gasch, ankaŭ kunlaboris Eduardo Iriarte Gahete, cele al tiuj partoprenantoj scipovantaj la anglan lingvon. La ĉeestantoj alvenis en la kulturen centron dum la tuta tago, entute ok horoj. La plejmulto el ili

konis nenion pri la internacia lingvo kaj por “superi” la taskon estis necese ĉeesti 25-an minutan klason kaj poste traduki en esperanton malgrandan tekston.

Dum la nokta festo, kiam oni malfermis la ĝinkanon, oni disdonis premiojn al la teamoj kiuj atingis pli da poentoj. Kiam oni menciis la longan serion da taskoj plenumitaj, la kurso de Esperanto ricevis tondran aplaŭdodon. Multegajn dankojn al Antonio kaj al Eduardo, kiuj respondiĝis pri ĉio kaj kaŝis sekrete ĉi tiun aferon, ĉar tiu estis unu el la nepraj petoj de la organizantoj kiuj deziris malkovri nenion al la partoprenantinoj ĝis tiu tago.

★ La ĵurnalo *ABC* aperigis fine de la monato novembro artikolon de Guy SORMAN sub la titolo “Saluton”. Ĉi tiu kontribuo aperis sur unu el la ĉefaj paĝoj de ĉi tiu tutnacia ĵurnalo. Guy SORMAN (Parizo 1944) estas ĵurnalisto, filozofa, ekonomiisto kaj influa verkisto tute favora al klasika liberalismo. La artikolo prezentis la internacian lingvon Esperanton tutfavore, laŭ la propra verkisto li mem lernis iomete la lingvon dum la 60-jardeko. Post la apero de ĉi tiu artikolo oni ricevis kelkajn inform-petojn pri Esperanto de legantoj de tiu ĵurnalo interesitaj pri la afero.



Sur la ĵurnalo *ABC* aperis artikolo kun esperanta titolo ĉe unu el la plej elstarindaj paĝoj.

EL PUERTO DE SANTA MARÍA (Kadizo)

★ La pasintan 20an de decembro la radio-elsendejo “*Radio Puerto*”, ene de la programo “*El Puerto Activo*”, dediĉis unu-horan programon al Esperanto. Dum la elsendado la direktoro de la programo intervjuis al Antonio Rodríguez Gasch, membro de Sevila Esperanto-Asocio kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kaj al Vicente Manzano, esperantisto loĝanta en El Puerto de Santa María.



VIVO DE LA ASOCIO

★ Por tiuj kiuj amas astronomion estas plezuro informi, ke jam ekzistas fako de nia asocio pri ĉi tiu temo. Temas pri “Rondo Sputniko”, kie eblas aperigi kaj legi pri astronomiaj novaĵoj, jen la interreta ligilo <https://sputniko.esperanto.ac> . Pravideble, oni organizos por ĉiuj interesitoj astronomiajn ekskursojn kaj specifajn programerojn pri ĉi tiu temo, tiu unua jam okazinta dum la Andaluzia Kongreso en Antekero, kiam estis eble viziti la Astronomian Observejon en El Torcal kaj observi la stelojn.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en la reto:

TTT-paĝo: www.esperanto.ac (ankoraŭ ne definitive konstruita).

Blogo: <http://andaluciaesperanto.blogspot.com.es/>

Ret-adreso: esperanto14@ono.com

Kiel alparoli al ekster-teranoj. La komenciĝo de la ekzo-lingvistiko

La plej popularaj filmoj kaj TV-felietonoj ĉiam pripensis la unuan kontakton inter teranoj kaj ekster-teranoj kun mortigaj fulmotondroj, atomaj armiloj kaj laseraj bataloj, kie unuamomente la teranoj ŝajnis esti kondamnitaj je la malapero sed, post mikrobaj atakoj, la ekster-teranoj estas venkataj. Ĉi ĉio ja povas esti allogaĵo por kapti la atenton de la film-spektantoj, tamen estas necese aserti, ke se tiu unua kontakto okazus, la unua solvenda afero estus trovi taŭgan komunikilon inter ni, teranoj, kaj tiuj eblaj ekster-teraj vizitantoj. Jen la kerno de la filmo *Arrival* (Alveno), kie aperas nek laseraj armiloj, nek fulmotondraj atakoj celantaj la malaperon de la homa raso.



La solvo proponita en la filmo ne restas tute klarigita, ĉar la ekster-teranoj uzas propran alfabeton, bazita sur ideogramoj skribitaj sur rondaj linioj, kiuj estas komprenataj ekde la unua momento de lerta lingvistikistino, kvankam neniam oni klarigas kiamaniere ŝi deĉifras la signifon de tiuj ideogramoj, verŝajne ŝi uzas nur sian imag-povon. Tamen, estas interese prezenti tiun aferon, kaj tiun problemon se iufoje okazus tiu unua kontakto, ene de filmo pri scienc-fikcio, ĉefe se la alfabeto mem tute rilatas kun la ideo pri spaco kaj tempo, kiu reale estas la ĉefa ideo de tiu filmo.


Se paroli pri la afero ebligi la komunikon inter tera kaj ekster-tera racioj, estos necese diri, ke tiu estis unu el la ĉefaj aferoj de SETI, tiu projekto, lanĉita de samnoma instituto kie partoprenis interalie la fama sciencisto Carl Sagan, kiu serĉas eksterterajn raciojn. La ĉefa esplormetodo de SETI estas la revizio de fontoj de la elektromagneta spektro devenantaj el la ekstera spaco. Por SETI ekzistas du bazaj eblecoj komuniki kun tiuj eksterteraj racioj; unue, oni traserĉas la eteron pri interesaj radio-signaloj kaj due, oni elsendas proprajn signalojn el nia planedo kaj poste ni esperas respondojn, jen ankaŭ la kerno de la filmo *CONTACT* (Kontakto) de 1997.



La tempo estas la plej grava problemo por tiu projekto, pro la fakto, ke se ni elsendas signalojn riceveblajn de racio loĝanta en distanco de 100 lumjaroj kaj tiu civilizacio certe respondas, estus necese atendi 200 jarojn post la unua komuniko. Tamen, malgraŭ tio, la projekto ekzistas, unuamomente kun la helpo de la usona registaro kaj nuntempe nur dank'al la ekonomia apogo de privataj instancoj.


Kiel kuriozaĵo, ni diru, ke la unua ideo ebligi kontakton kun ekster-teranoj aperis en la 19-a jarcento, kiam la aŭstria astronomo Joseph Johann Von Littrow (1781-1840), proponis la ideon plenigi longegajn fosaĵojn kavigitajn en la Sahara dezerto pere de keroseno kaj poste bruligi ilin, tiel oni povus sendi mesaĝojn al ebla civilizacio loĝanta ĉe apudaj planedoj. Kvankam la ideo ŝajnas frenezaĵo estas necese agnoski, ke temis pri la unua projekto ebligi kontakton kun ekster-teranoj, tamen la afero pri la uzotaj signoj aŭ alfabeto ankaŭ ne solviĝis en tiu projekto.

La unua serioza projekto sendi mesaĝon al ebla ekstertera racio okazis en la jaro 1977. Tiam, ene de la kosmo-sondilo *Voyager* oni enmetis gramofonan diskon el oro kun informoj pri ni: la teranoj. Sed denove la tempo estos problemo, ĉar tiu spaco-navo atingos la ĉirkaŭaĵon de la plej proksima stelo de nia sunsistemo nur post 40.000 jaroj ! La disko enhavas sonojn kaj bildojn de la Tero kun la celo montri la diversecon de nia vivo kaj kulturoj. Komprenible, la ebla atingota racio devos esti kapabla legi, kompreni kaj malĉifri la diskon. Sur ĝi aperas ankaŭ desegnaĵoj por montri kiel ni estas.




Kosmo-sondilo lanĉita en la jaro 1977 kaj gramofon-disko el oro enhavanta informojn pri nia civilizacio

Desegnaĵo aperanta sur la disko kun informoj pri kie situas nia planedo kaj kiel ni estas.



Sur la disko oni surbendigis salutojn en 55 lingvoj, inter ili ankaŭ en esperanto. Krome, ankaŭ aperas sonoj de balenoj kaj selektaĵo de muziko el pluraj kulturoj. Tamen, ĉi tiu nova pruvo ne trovas solvon por uzi taŭgan komunikilon, ĉar por esti sukcese komprenataj la salutoj kaj eldiraĵoj surbendigitaj en la gramofondisko, estus necese, ke la ekster-teranoj kapablu kompreni unu el niaj lingvoj kaj tio ja, evidente, ne estus tre logika. Do, la afero trovi tiun komunan alfabeton aŭ ĉifr-sistemon ankoraŭ oni ne solvis.

En la jaro 1960 oni diskonigis projekton por trovi tiun taŭgan “lingvon”, temas pri *Lincos* (Lingua Cosmica, en la latina lingvo). Naskiĝis tiam la ekzo-lingvistiko, tio estas: la branĉo de la lingvistiko celanta studi la eblajn komunikilojn kun eksterteraj racioj. La lingvon kreis la germana matematikisto Hans Freudenthal. Li estis profesoro en la Universitato de Amsterdamo, dum la dua mond-milito la naziaj invadantoj de Nederlando enkarcerigis lin. Post sia liberigo li atingis novan labor-postenon kiel profesoron pri geometrio en la Universitato de Utreĥto. En la jaro 1960 li publikigis la libron *Lincos: Design of a Language por Cosmic Intercourse* (Lincos: Dezajno de lingvo por inter-kosma komuniko).



Hans Freudenthal
(1905-1990)

Sur la antaŭparolo de la libro Freudenthal sciigas, ke la celo de sia laboro estas krei lingvon kiu povus esti komprenata de homo kiu ne familiariĝas kun la strukturo de la naturaj lingvoj. Laŭ la aŭtoro, Lincos esence estus lingvo elparolebla, ne nur skribebla, bazita sur fonemoj kaj ne sur literoj. La sonoj estus kiel frekvencoj malsimilaj en daŭro kaj ond-longeco. Rilate la srkibadon oni uzus matematikajn, sciencajn kaj logikajn simbolojn. La unuaj mesaĝoj proponitaj de Freudenthal uzas mallongajn kaj regularajn sonojn, nomitaj *Peeps* (impulsoj), tiel unu impulso egalus al

unu; du impulsoj egalas al du, kaj tiel plu. La sekvanta paŝo estus ebligi komunikon per formuloj bazitaj sur tiuj ciferoj, ekzemple $1 = 1$; $1 + 1 = 2$; $1 < 2...$ Mesaĝon post mesaĝo la formuloj fariĝus pli kompleksaj.

Jen ekzemploj de la unuaj paŝoj en la lingvo Lincos:

● = 1	●● = 2	●●● = 3
● + ● = ●●		1 + 1 = 2
●● + ● = ●●●		2 + 1 = 3
●●● > ●●		3 > 2

Poste, la aŭtoro klarigas konceptojn por priskribi konduton kaj interparolon de individuoj, tiel oni prezentas demandojn, aprobojn, malaprobajn, konojn, atendojn, promesojn, ktp. Jen ekzemplo pri ebla konversacio, la parolantoj estas Ha kaj Hb (H egalas al homo).

Ha inq Hb ? (Homo demandas al alia homo).

Ha inq Hb? $x + 1 = 2$ (Homo demandas al alia homo kiun nombron oni devas adicii al nombro 1 por atingi 2).

Hb inq Ha 1 (Homo respondas ke la nombro estas egala al 1).

Ha inq Hb ben (Homo diras ke la respondo estas ĝusta).

Hb inq Ha 2 (Homo respondas ke nombro estas egala al 2).

Ha inq Hb mal (Homo diras ke la respondo ne estas ĝusta).

Fine, Freudenthal pritraktas en sia libro temojn rilatajn al mezuroj, spaco, movo, maso kaj ankaŭ pri la fizikaj karakterizaĵoj de la homoj kaj de la sunsistemo. Tamen, la manko de dua parto de la libro, kiun la aŭtoro promesis sed fine li ne publikigis, lasis multajn aferojn ne-responditajn pri ĉi tiu lingvo-projekto. Malgraŭ tio, estas necese agnoski, ke ĝi estis la unua serioza pruvo ellabori komunik-sistemon inter homoj kaj ekster-teranoj. Kiel kuriozaĵo, ni diru, ke en la filmo *Contact* (1997) sur la ekranoj de la radio-teleskopo de Arecibo (Porto-Riko), aperis tekstoj en ĉi tiu ekzo-lingvo.

Urso dancas en Fuente Carreteros (Kordovo)

Ni jam parolis en alia numero de nia revuo pri la vilaĝoj fonditaj en Andaluzio dum la 18-a jarcento, dum la Klerisma Epoko pli konkrete, kies unuaj enloĝantoj estis homoj venigitaj el Svislando, Germanio kaj Aŭstrio. Temas pri vilaĝoj kiel *La Carolina* en la provinco Jaeno; *La Carlota*, *Fuente Palmera* kaj *San Sebastián de los Ballesteros* en Kordovo aŭ *La Luisiana* en Sevilo. En tiuj vilaĝoj ne nur ekzistas ankoraŭ familiaj nomoj propraj de tiuj german-lingvaj zonoj, kiel *Hans*, *Wic*, *Reifs*, *Hammer*... sed ankaŭ, okazas festoj kiuj ne apartenas, origine, al la andaluzia kulturo, sed ili havas ja centr-eŭropan devenon. Unu el tiuj festoj estas la “Danco de la Urso” en *Fuente Carreteros*, vilaĝo proksima al *Fuente Palmera* en la kordova provinco.



Unue estas necese memori, ken en Andaluzio ne estas eble trovi ursojn. La plej *proksimaj* troviĝas en Asturio aŭ en Pireneoj, tio estas je 800 kilometroj de Andaluzio. Tamen en Fuente Carreteros, fine de ĉiu jaro, la popolo organizas unue la “Dancon de la Frenzuloj” kaj poste la “Dancon de la Urso”.

Kiel dirite, la unuaj koloniigantoj de tiu zono, alvenintaj el Centruropo, ankaŭ alportis siajn proprajn tradiciojn, inter ili tiu de la “Danco de la Frenezuloj”, por memori la mortigon de la Inocentaj Sanktuloj, fare de la juda reĝo Herodo, ĉiun 28-an de decembro. Dum ĉi tiu spektaklo ses maturaj dancantoj (*la frenezuloj*) protektas dancante alian kiu reprezentas Jezuon (*la frenezuletino*), kiu devas esti savita de tiu buĉado.

Kiam tiu unua danco finiĝas aperas du pliaj dancantoj, unu masko-vestita en urso kaj alia kiu regas la *beston* per ŝnuro kaj vipo. La figuroj estas tute similaj al tiuj centr-eŭropaj homoj kiuj mez-epoke dancigis urson kun tamburino dum oni ludis muzikilon. En ĉi tiu dancado la urso emas ĝeni la infanojn, kiuj devas ekkuri por ne esti kaptitaj de la *bestego*.

Laŭdire la festo estas tute ligita al terkulturaj tradicioj. La urso reprezentis en la centro de Eŭropo malbonajn aŭgurojn, eĉ la malbonan veteron por la rikoltoj, do ĉiu vipo-blato lanĉita kontraŭ la urso estas pruvo por forpeli tiujn malbonajn aŭgurojn. Ĉi tiu festo okazas en Fuente Carreteros ekde antaŭ 300 jaroj, kvankam verdire tie ne estas eble renkonti urson en la ĉirkaŭaĵoj, tamen tiu tradicio estis tute ligita al la popola kulturo, tiel post la civitana milito en Hispanio (1936-1939) kiam la malŝato kaj la malriĉeco videblis surstrate en la vilaĝo, ĉi tiu festo fariĝis pli kaj pli populara, sendube ĉar tiu dancado estis efika maniero por forpeli la malŝaton kaj la malbonan vivon reprezentita de la urso.



Dancado de la frenezuloj en Fuente Carreteros (Kordovo)

Lingva Angulo

SE + Us-formo

SE estas subjunkcio signifanta “*en la okazo, kiam*”, “*kun la supozo, ke*”, “*sub la kondiĉo, ke*” kaj ĝi montras la rilaton inter io fakte okazinta, okazanta, okazonta aŭ eĉ okazunta kaj ĝia sekvo. Tio estas, la verbo povas aperi sub la formoj *as, is, os* kaj *us*. La verbo sur la dua frazo, la sekvo, povas aperi sub tiu sama formo aŭ sur alia. Ni vidu ĉi-numere kiel uzi kaj la ĝustan signifon de la subjunkcio SE kaj la verbo sub US-formo.

Ni vidu ekzemplon:

“Se mi aĉetus novan aŭtomobilon, mi povus vojaĝi ofte en vian urbon”

(Si yo me comprara un automóvil nuevo, podría viajar a menudo a tu ciudad)

A la vista está, que el uso de la forma condicional en esperanto con la terminación –US del verbo, se traduce en español en las frases con “SE”, no como condicional “compraría”, sino como subjuntivo “comprara”.

Se ni uzas SE+us-formon, oni montras fantazion aŭ deziron, tio estas: ne-realaĵo. Pro tio estas tute same uzi US-tempo aŭ OS-tempo, pro la fakto, ke ĉe estonta tempo (uzo de OS-formo), ne eblas ĉiam fari klaran distingon inter fantazio kaj fakto, ĉar la estonteco ĉiam estas necerta, tiel:

“Se mi aĉetos (aŭ aĉetus) novan aŭtomobilon, mi povos (aŭ povus) vojaĝi ofte en vian urbon”.

Kontraŭe, se oni uzas AS-formon ni montras, ke temas pri ĉiam valida principo: *Se mi aĉetas novan aŭton, mi povas vojaĝi ofte*. (“Si me compro un coche nuevo, puedo viajar a menudo”), jen principo, ne deziro aŭ fantazio. Aŭ se oni uzas IS-formon montras realan mondon, tio kio vere okazis, ne temas pri io kio aŭ okazos aŭ pri simpla deziro.

Do, la uzo de US-formo post *SE* egalas al la uzo de la subjunktiva aŭ volitiva formo de la verboj en la hispana lingvo. Tiu formo oni devas uzi nur por deziroj aŭ pri faktoj ne-realaj (fantazioj), ne oru io kio vere okazis. Jen pliaj ekzemploj:

- Se la lernanto konus la respondon, li aprobus la ekzamenon.
(*Si el alumno conociera –hubiera conocido- la respuesta, él aprobaría –habría aprobado- el examen*).

Pere de ĉi tiu lasta ekzemplo ni deziras montri, ke oni ne devas traduki en esperanton laŭvorte el la hispana lingvo. Vidite, ke ni diris “*habría aprobado*”, tamen ni uzis simplan US-formon “*aprobus*”. Do, por frazoj kun la subjunkcio *SE* kiuj montras dezirojn aŭ fantaziojn, ni uzu simplan US-formon, ni ne devas serĉi pliajn kompleksajn verbajn formojn.

Jen pliaj ekzemploj:

- Se mi havus multe da mono, mi aĉetus novan domon.
(*Si yo tuviera mucho dinero, me compraría una nueva casa*)

En la hispanlingva traduko de ĉi tiu frazo ni uzis subjunkcian formon + kondiĉan, en esperanto nur US-formo.

Kiel dirite la ĉefa diferenco inter tiu frazo kaj la jena: “*Se mi havas multe da mono, mi aĉetos novan domon*”, estas la fakto, ke ĉi tiu lasta estas tutcerta principo: mi havas multe da mono, do mi, tutcerte, aĉetos novan domon. Tamen, se oni uzas US-formon: mi havus multe da mono, do, mi aĉetus novan domon: temas nur pri deziro aŭ eĉ pri

fantazio, ĉar pere de la uzo de la US-formo oni montras, ke mi ne havas multe da mono.

Do, ne forgesu:

- ➔ En la hispana lingvo: *Si.... Subjuntivo, condicional.*
- ➔ En esperanto: *Si... us-formo, us-formo.*

Deziraj SE-frazoj:

Se estas uzata ankaŭ en frazoj por esprimi fortan deziron, kiun verŝajne oni ne povas atingi. Ĉi-kaze la verbo ĉiam devas havi US-formon en tiuj frazoj. Jen ekzemploj:

- Ho, se mi estus pli inteligenta !
(¡Oh, si yo fuera más inteligente!)
- Ve, se mi konus vin antaŭe !
(¡Ay, si yo te hubiera conocido antes!)
- Ho, se mi loĝus en la kamparo !
(¡Oh, si yo viviera en el campo!)

En ĉi tiaj frazoj la vera ĉeffrazo estas subkomprenata, ekzemple: *“Ho, se mi estus pli inteligenta...(mi atingus pli bonan labor-postenon).*

Por fortigi la deziron en ĉi tiuj SE-frazoj oni povas aldoni *NUR*. Ekzemple:

- Ve, se mi nur loĝus sola !
(¡Ay, si yo [de verdad] viviera solo!)

*Poezia Angulo**Dum la dormo*

Dum la dormo mi vagadas
sur kotonaj nuboj blankaj
por klarigi ĉiajn dubojn
pri mia vivo senkalma.

Danke al miaj flugiloj,
ĉar mi suferas kapturon,
mi havas tutan certecon
igi foren ĉiajn timojn.

Dum la dorm' fojfoje belas
malbelec' kaj necerteco
ĉar aero fantazia
kumportas belegajn sentojn.

Dum la dormo mi poemas
pri malsimilaj aferoj,
danke al la muzo mia,
revoj, viv' kaj amosento.

Dio benu miajn noktojn
kaj vivoplejan matenojn
kaj miajn revojn senfinajn
kiuj kvietigas ĉagrenon.

La 20-an de julio 2016



Ángel Arquillos López

Turismi en ... Paymogo (Onubo)

En la onuba provinco, tuj apud la portugala landlimo, ĝuste je 5 kilometroj de nia najbara lando, troviĝas Paymogo, prononcu *Pajmogo*. La naskiĝo de ĉi tiu andaluza vilaĝo okazis meze de la 13-a jarcento, okaze de la konkero de la regiono fare de la Templaj Ordino favore al la Kastilia Reglando. Tiuj kavaliroj, kiuj venis el *Sankta Lando* (Jerusalemo), luktis kontraŭ la islamanoj en la Ibera Duoninsulo kaj kiel pago al tiu helpo, la Ordino ricevis grandajn zonojn, unu el tiu zono estis la landlimo inter Kastilio kaj Portugalio sude de la Ibera Duoninsulo.

La nomo de la vilaĝo ja estas sufiĉe mistera. Iuj asertas, ke la nomo suliĝas al la fakto, ke en tiu zono loĝis mago, iaspeca druido, do la vilaĝo estis konata kiel *Pais del Mago* (Lando de la Mago). La vortoj *Pais* kaj *Mago* formis Paymogo. Aliaj asertas, ke la nomo devenas en la latina kaj la portugala lingvoj, konkrete el *Pagus* (vilaĝo en la latina lingvo) kaj *Mogo* (landlimo). Do, Paymogo estus vilaĝo troviĝanta ĝuste sur la landlimo. Unua aŭ alia versio sendube povas esti certa, por la fakto, ke Paymogo troviĝas tuj apud la portugala landlimo kaj krome ĉe la ĉirkaŭaĵoj troviĝas arbaroj kun abundaj medicinaj herboj.



Blazono de Paymogo

Alia kuriozaĵo rilate la nomon Paymogo estas la fakto, ke ĝis la 19-a jarcento la vilaĝo nomiĝis “Paimogo”, tamen, tiam oni anstataŭis la literon I pere de Y, do ekde tiam la oficiala nomo estas Paymogo.

Nu, post la fondiĝo reale temis pri vilaĝeto kun apenaŭ kelkdeko da enloĝantoj, entute 51 en la jaro 1500.

Tamen, en la jaro 1700 ĉe Paymogo jam loĝis 1600 homoj, kies ekonomiaj rimedoj estis ĉefe la mielo kaj la vakso, jen la signifo de la abelo troviĝanta sur la blazono. Pro la fakto, ke Paymogo situis apude al la Portugala landlimo, de tempo al tempo okazis luktoj pro teritoriaj disputoj inter ambaŭ reglandoj (Kastilio kaj Portugalio), tiel dum la 17-a jarcento, oni starigis kastelon por defendi la zonan.

En la 19-a jarcento oni eltrovis piriton, do oni konstruis minejojn por ekspluati tiun mineralan riĉecon, sed la ekspluatado ne daŭris multe da tempo kaj tiel ekde la fino de la 19-a jarcento la ĉefaj resursoj de la vilaĝo estas la porka kaj la ŝafa bredado. Nuntempe ankaŭ temas pri tre alloga loko por mont-bicikli, rajdi kaj pad-marŝadi meze de belega naturo.

Monumentoj:

- Preĝejo – Kastelo *Santa María Magdalena*.



La nuntempa preĝejo stariĝis sur la ruinoj de la kastelo konstruita dum la 17-a jarcento. La kastelo utilis kiel fortreso dum la oftaj luktoj kontraŭ Portugalio en ĉi tiu landlima regiono. Escepte la turo de la preĝejo, la cetera ekstera konstruaĵo tute similas al kas-

telo, tamen interne de la konstruaĵo estas preĝejo. Komence de la nuntempa jarcento oni rekonstruis la turon kaj la tegmentojn de la monumento.

- Urbodomo

La konstruaĵon oni starigis dum la 18-a jarcento kaj unuamamente utilis kiel grejno-tenejo. Poste ĝi estis lernejo kaj nuntempe tie sidejas la urbodomo kaj la biblioteko de Paymogo.

- Preĝejo de la Sankta Kruco



Kvankam temas pri moderna konstruaĵo, ĉi tiu preĝejo meze de la kamparo estas vere alloga. Meze de la pasinta jarcento la virinoj de Paymogo ekorganizis pilgrimadon en la kamparon, do estis necese starigi preĝejon. La konstruaĵo sekvas portugalan arkitekturan stilon.

Gastronomio:

La fungoj estas la ĉefa produkto en Paymogo kaj ĉefe la *gurumelo* (*Amanita Ponderosa*). Dum la monato marto oni kunorganizas, kune kun la portugala najbara vilaĝo Mértola, gastronomian festivalon por disvastigi ĉi tiun produkton. Bongustaj estas ankaŭ la kapr-fromaĝo kaj ĉiuj dolĉaĵoj el mielo, ankaŭ produktita en la vilaĝo.

Festoj:

Estas tre famaj la karnavalaj festoj de Paymogo, ankaŭ la pilgrimado en la preĝejon de Sankta Kruco. Meze de julio okazas flamenka festivalo por junuloj, kun la celo apogi la artan karieron de tiuj kiuj ekkantas laŭ flenkaj stiloj. Elstarindas ankaŭ la festo de la *Pirulitos de San Juan y San Pedro*, tiam, fine de la monato junio, ĉiu strato ornamas longan lignopecon per floroj, herboj kaj ovo-ŝeloj bunte pentritaj.

ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Banco BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada)
ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2017

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.



Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Serafin Baudín Agüero

Aperis nova eldono de la prestiĝa verko *La Danĝera Lingvo*, de Ulrich LINS. En ĉi tiu libro la aŭtoro pritraktas la persekutojn kontraŭ la Esperanto-movado, precipe en la Hitlera Germanio kaj en la Stalina Soveta Unio. Verdire, ĉi tie en Hispanio, estus necese verki propran eseon pri ĉi tiu sama temo, tio estas; la persekutado kontraŭ Esperanto kaj la esperantistaro ĉefe dum la civitana milito kaj la posta frankisma reĝimo. Ene de tiu prirevata libro trovus elstarindan lokon nia hodiaŭa ĉefrolulo: Serafin BAUDÍN AGÜERO.




Serafin Baudín naskiĝis en Malago en la jaro 1881. Li studis en la Universitato de Granada, tie li ekkontaktis kun la nova internacia lingvo Esperanto kaj li tre baldaŭ regis ĝin. En la jaro 1905 li aprobis ekzamenojn por atingi postenon kiel instruiston, lia unua labor-posteno estis lernejo en *La Guardia*, vilaĝo je 10 kilometroj de Jaeno. Tie, en la jaro 1906 li formis la Esperanto-Grupon "Mentesa", tiu estis la nomo de la vilaĝo dum la romia epoko. En tiu grupo Serafin Baudín agadis kiel sekretario kaj ankaŭ kiel reprezentanto (konsulo) de la Esperanto-Movado en la vilaĝo.

Li ofte propagandis la lingvon kaj tiel, en la jaro 1907, li prelegis pri Esperanto en la Normala Lernejo de Jaeno. Ĉeestis la

paroladon granda nombro da lernejestroj kaj profesoroj de la urbo Jaeno. En 1908 li atingis novan postenon en la provinco Almerio, unue en la vilaĝeto *Jauro* kaj poste en la urbo Almerio mem. Tie, li komencis ankaŭ sindikalismajn agadojn kun la celo unuigi la instruistojn de la tuta Hispanio. Serafin Baudín verkis artikolojn en fakaj naciaj revuoj kie li klarigis, ke estus necese levigi la socian konsideron rilate la instruistojn, ĉar nur tiamaniere, infanoj kaj ĉefe gepatroj, akceptus pli bone ĉion de ili instruitaj. Ĉi-sence li ankaŭ kunlaboris en la organizado de la asocio de instruistoj de la provinco Almerio. Li ankaŭ partoprenis en politikaj asocioj kaj tiel estis tre oftaj paroladoj de Baudín en la Respublikana Centro de Almerio.

Rilate Esperanton, li eldonis en Almerio la revuon *La Edukado*, la unua faka revuo eldonita en la internacia lingvo en Andaluzio, kies celo estis defendi la instruadon kaj propagadon de Esperanto, kvankam la revuo havis ne-daŭran aperadon. Liajn laborojn pro la disvastigo kaj instruado de la internacia lingvon oni agnoskis internaci-nivele, tiel li estis sekretario de la Internacia Societo Pedagogia.


Dum la 20-a jardeko li atingis novan labor-postenon en Malago. Li estis direktoro de la lernejo "Bergamín". Tie, li organizis kurson de esperanto, kies unuaj lernantoj estis membroj de la Skolta Trupo de Malago. En ĉi tiu urbo li aliĝis al PSOE (Hispana Socialisma Partio) kaj al la sindikato UGT (Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj). En 1930 li fondis kaj regis la revuon "*Málaga Socialista*" (Socialisma Malago), oficiala organo de PSOE en Malago, li ankaŭ kunlaboris en la ĵurnalo de UGT "*El Trabajo*" (La Laboro).



Letero sendita en esperanto en la jaro 1912 kaj subskribita de Serafin Baudín

La ekigo de la civila milito en Hispanio en julio 1936 finigis ĉi ĉiujn laborojn. La puĉo ne sukcesis unuamomente en Malago, tiel ĝis la komenco de la jaro 1937 la aŭtoritatuloj en Malago sekvis la respublikanan registaron. Sed en la monato februaro de 1937 la urbon konkeris la frankisma armeo kaj la agado de ĉiuj maldekstraj partioj ĉesis en Malago. La novaj aŭtoritatuloj ekigis esploradon rilate suspektatojn kunlabori kun la makdestraj partioj kaj ĉiujn instruistojn de la urbo. Do, formiĝis la “Komitato por la Elpurigado de la Instruado”, kies ĉefa celo estis pristudi la politikajn, religiajn kaj moralajn agadojn de ĉiuj instruistoj. La unua informo verkita pri la instruisto Serafin Baudín Agüero tekstis jene:

“Liaj idealoj apartenas al la ekstrema maldekstro. Komence de la Respubliko li estis direktoro de la ĵurnalo “El Trabajo”, tie li verkis tre ekstremajn artikolojn. Lia konduto ĉiam estis malbona kaj senmorala. Oni ne povis scii ĉu dum la marksisma regado li okupis politikajn postenojn. Li fuĝis el la urbo kiam la naciaj trupoj konkeris Malagon.”



Oficiala Rezolucio de 18-Nov-1940, aprobanta la forigon de Serafin Baudín Agüero el la instruista kariero.

Samtempe la novaj aŭtoritatuloj konfiskis lian domon en la kvartalo *Ciudad Jardín* de Malago, tie, laŭ informo redaktita de la provinca registaro, oni eltrovis paf-armilojn, bombojn kaj liston de dekstrulaj homoj kiuj devus esti mortpafitaj, verŝajne tio ŝajnas inventita akuzo.

Dank'al la informo de la nova registaro, ni scias, ke Serafin Baudín fuĝis el Malago antaŭ la konkero de la urbo fare de la frankisma armeo. Li ne partoprenis rekte en la luktoj, tamen sia filo, Serafin Baudín Millán luktis gerile

en la malaga montaro favore al la Respubliko. Malgraŭ tio, post la milito, la filo de Serafin Baudín Agüero rekomencis sian karieron, ankaŭ li estis instruisto, kaj li eĉ ricevis gravajn agnoskojn en la postaj jardekoj kiel prestiĝa docento.

En la jaro 1940, tuj post la fino de la civila milito, Serafin Baudín Agüero marŝis en Ceŭton. Tie, lia filino edziniĝis al militisto, do li povis havi pli trankvilan vivon fore de Malago. En novembro de tiu sama jaro, 1940, la Komitato por la Elpurigo de la Instruado decidis forigi lin definitive el la instruista kariero, la ĉefa akuzo estis, ke li estis ekstrema marksisto, perfida ateisto kaj danĝera socialisto kiu instruis al la infanoj por formi socialismajn brigadojn... ĉu la instruado de esperanto al junaj skoltistoj helpis al la komitatanoj pripensi tion?

Nu, ene de la dosiero ellaborita de la Komitato, kies kopio troviĝas ankaŭ ĉe la Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, aperas artikolo publikigita en ĵurnalo de Malago, supozeble inter julio de 1936 kaj februaro de 1937, tie Serafin Baudín apogas la lukton de la Respubliko kontraŭ la faŝismo. Je la fino de la artikolo li skribas en esperanto: "*ĉiam antaŭen!*". Serafin Baudín Agüero forpasis en Ceŭto meze de la 40-a jardeko.

J.M.R.H.



FLAMENKO

La kantaĵo “Martinete”

La *toná* estas la plej antikva cigan-flamenka kantaĵo kaj ĉiuj ili devenas el ĝi. Post la *toná* aperis la *carcelera*, kiu temas pri karceraj temoj kaj la *martinete*, kantita de forĝistoj dum la laboro. Ni ne forgesu, ke la forĝo rekte rilatas al ĉevaloj, besto ligita al la cigana kulturo. Du teorioj ekzistas pri la deveno de la nomo *martinete*. Oni asertas, ke la nomo devenas de la samnoma grandega martelo kiu bezonis du homoj por labori per ĝi. Laŭ aliaj, la nomo *martinete* devenas el la balgobloviloj uzitaj en la forĝejo, kiu ankaŭ havas tiun nomon.



Kiel dirite, la *martinete* estas la tipa kantaĵo ludita en la forĝejoj, ne dum la laboro, sed dum la ripozo aŭ dum la atendo ĝis la malvarmigo de la materialo. Pro tio, ofte, la kantaĵoj komenciĝas per onomatopeo *trank, trank,*

tio similas al la marteladoj de la forĝistoj sur la amboso. Do, la *martinete* estas kuraĝa kanto, ĉar ĝi estas akompanata de neniu muzikilo, nur de konstanta martel-frapado.

Oni diras ankaŭ, ke la *martinete* reale estas improvizita kantaĵo, pro la fakto, ke ne estas necesa muzikila akompanado, tiel, la kantisto povas ludi laŭ sia propra volo. Tamen, normale la teksto de la *martinete* estas formata de kvar ok-silabaj versoj, kiuj ne ripetigigas se temas pri *martinete natural* kaj kun ripeto de verso(j) se temas pri *martinete redoblado*.

En la unua konkurso pri flamenka kantado, okazinta en Granado en la jaro 1922, ĉiuj kantistoj devis ludi *martinete*, tiel, ekde ĉi tiu

altranga agnosko ĝi aperas en la repertuaro de la plej gravaj flamenkaj kantistoj.


Trank, trank.

*Ke mi frenezas, diri ne eblas,
tio al mi tute ne okazas.
Por frenez' rimed' troveblas
kaj mi, pro agoni' agacas.*

Trank, trank.

*Laŭte diru deklamanto
forte krii la proklamon:
ĉiu ŝuld' trovas paganton
kaj baldaŭ finiĝas l' amo.*

Forĝeja Vortaro



ANDALUZIA KUIRARTO

Ĉampinonoj laŭ la andaluzia stilo

Por trovi ĉampinonojn ne estas necese promenadi je frua horo tra ombra arbaro, ĉar ĉi tiu fungo troviĝas ofte en kiu ajn vendejo. Hodiaŭ ni prezentas tre facilan preparadon kun ĉampinonoj kaj la rezulto estas bongustega.

Jen la necesaj ingredientoj:

- Ĉampinonoj, 1 kilogramo.
- 4 ajleroj.
- 1 cepo.
- Migdaloj, 50 gramoj.
- Ruĝa papriko pulvorigita, 1 kulereto.
- Petroselo.
- Ajlo.
- Oliv-oleo, 1 kulero.
- Blanka vino, ¼ litro.
- Salo.



Jen la preparado:

- 1.- Ene de pistujo, metu la migdalojn, la petroselon kaj la ajlerojn. Ni pistas la tutaĵon.
- 2.- Aliloke, ni preparas kaserolon. Tien ni verŝas la oliv-oleon, kiam ĝi estos iomete varma ni aldonos la cepon tranĉitan, salon kaj atendu ĝis kiam la cepo rostetiĝos.
- 3.- Poste, en la kaserolon, ni metas la ĉampinonojn, tranĉitaj laŭ lametoj. Aldonu iomete da salo kaj rostigu ĉion dum 4 minutoj.

Aldonu la ruĝan paprikon pulvorigitan kaj dum kelkaj sekundoj, ne multaj, rostiĝu ĉion denove.

4.- Aldonu tiam la vinon kaj movu la tutaĵon. Softigu la fajron ĝis kiam la vino komencos forvaporigi.

5.- Kiam ne estos eble vidi la vinon aldonu la pistaĵon kiun ni preparis unuamomente.

6.- Se necese aldonu iomete da salo. Movu ĉion kaj atendu du minutojn pliajn. Post tiu tempo la ĉampinĵonoj laŭ andaluzia stilo jam estas preparitaj.

Ĉi-recepta vortaro:



Ĉampinĵonoj



Ajlo / ajleroj



Cepo



Migdaloj



Ruĝa papriko pulvorigita



Petroselo



Oliv-oleo



Salo



Pistujo



Kaserolo


Blanka
Vino

Softigi la fajron

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La tablo de la Reĝo Salomono

Laŭ la Biblio, Dio, pere de sonĝo, ordonis al reĝo Salomono konstrui la plej grandan templon de la homaro en Jerusalemo, tie, la judoj povus gardi siajn plej sanktajn objektojn: la Keston de Interligo, la Menoron kaj la Tablon de la reĝo Salomono. Laŭdire, sur tiu tablo, Salomono verkis la veran nomon de Dio, tiu kiu ne povas esti skribita kaj nur prononcebla por krei, laŭ la kabala tradicio. Kompreneble Salomono ne skribis la nomon de Dio, li nur uzus simbolojn kiuj enhavus la necesajn datumojn por dedukti la nomon, ĉar, kiel dirite, laŭ la juda tradicio la nomo neniam povus esti skribita. Alie, la posedo de tiu tablo, kune kun la informo gravurita sur ĝi, estus vere grava, ĉar la posedanto ĝuus la formulon por krei kiel Dio. Tamen, laŭ la tradicio, se finfine iu posedus tiun tablon la fino de la mondo estus tre proksima.



La tablo restis tie dum 400 jaroj, eĉ post la detruo kaj rekonstruo de la Templo dum la babilona subpremado de la Juda Reglando. Tamen, kiam la romianoj detruis la plej saktan konstruaĵon de la judoj en la jaro 70 p.K., ili forrabis ĉiujn sanktaĵojn de la judoj. Tiuj, senditaj en Romo, arivis en la Templon de *Jupitero Capitalino* en Romo, tie la tablo de Salomono restis dum pliaj 4 jarcentoj.

En la jaro 410 la armeo de la visigota reĝo Alariko la 1-a disrabis Romon kaj ĉiujn trezorojn trovitajn oni sendis en Tuluzon (Francio), la ĉefurbo de la visigotoj. En la jaro 507 la franka reĝo venkis la visigotojn en la urbo *Vouillé*, do, ili marŝis en la Iberan Duoninsulon kun siaj tutaj trezoroj. La historiisto Prokopio de Kesarea, skribis en la jaro 545: “...*ili fuĝis kaj foriris kun la trezoroj de Salomono, la reĝo de la hebreoj. Temis pri mirindaj objektoj ornamitaj*

de smeraldoj kiuj en antikvaj tempoj estis forrabitaj de la romianoj en Jerusalemo”.

Do, la tablo de Salomono alvenis en la Iberan Duoninsulon proksimume en la jaro 500 p.K. Kie gardis la visigotojn siajn plej gravajn trezorojn? Supozeble en la ĉefurbo de la imperio: Toledo aŭ proksime de la urbo, en la kastelo de Firas, en la nomita “Groto de Heraklo” kiu troviĝas sub la kastelo. En la jaro 711 la araboj venas en la Iberan Duoninsulon kaj venkis la visigotojn en la batalo ĉe la rivero Gvadaleta. Skribis la historiisto Abel Al-Hakam: “... *kiam Muza konkeris Hispanion, li alpropigis al si la tablon de Salomono, filo de Davido, kaj la kronno. La tablo estis en la kastelo nomita Faras, je du leŭgoj de Toledo. La tablo estis farita el oro kaj perloj kaj nenio en la mondo estis tiel mirinda*”. Pri la aparteno de ĉiuj trezoroj trovitaj disputis la du ĉefaj islamaj militestroj: Tarik kaj Muza. Oni scias, ke ili sendis kelkajn trezorojn en Damaskon, tamen la tablo ne troviĝis inter tiuj trezoroj forrabitaj.




Groto de Heraklo en Toledo

Kelkajn jarcentojn post la kristana konkero de la urbo Toledo, la tiea ĉefepiskopo, konanta la legendon pri la Tablo de Salomono, serĉis en la groto sub la kastelo, tamen li nenion trovis. Laŭ la tiutempaj kronikoj, li ne serĉis tiun

sanktaĵon pro la riĉecoj, sed ja pro la geometria ŝlosilo gravurita sur ĝi. Aliaj eĉ diris, ke la tablo reale estis spegulo, kie eblus vidi la okazantaĵojn. Post tiu sen-sukcesa serĉado la legendo pri la Tablo restis forgesata.

En la jaro 1937, juna funkciulo en Jaeno ricevis la ordonon noti la juvelojn kaj riĉaĵojn troviĝantaj en la Katedralo de Jaeno. La tiama respublika registaro dum la milito, deziris koni pri kiom da riĉaĵoj ili povus disponi por pagi la militajn kostojn. La funkciulo trovis

dokumenton pri la fondiĝo de sekreta socio kun la nomo “La Dek du Apostoloj”, kies membroj estis elstaruloj de la urbo Jaeno dum la 19-a jarcento kaj kies celo estis trovi la Tablon de Salomono. Laŭ tiu societo, la Tablo troviĝis en Jaeno aŭ proksime de la urbo. La membroj asertis, ke la islamanoj ne sukcesis forrabi la Tablon, kiu restis en Toledo. Tie, du pastroj de Jaeno, Totila kaj Rufinus, portis ĝin kaŝe en Jaenon, ĝuste en la urbon Martos, kie ambaŭ pastroj agadis kiel episkopoj, tie ankoraŭ estus kaŝita la Tablo.



Martos, en la provinco Jaeno.
Ĉu tie troviĝas la Tablo de la Reĝo Salomono?

La episkopo Totila mortis kiam li pilgrimadis en la Sanktan Teron kaj Rufinus eniris kiel monaĥo en la monaĥejo de la vilaĝo *Chiclana de Segura*, en Jaeno. Tie, li sciigis pri la desegnaĵojn gravuritajn sur la tablo al la ceteraj monaĥoj.

Tiu informo, generacion post generacio, alvenis ĝis la societanoj de “La Dek du Apostoloj”.

Eble nur legendo, sendube ! Tamen, meze de la pasinta jarcento oni eltrovis la tombon de la fondito de la societo kaj sur ĝi aperas stranga desegnaĵo kun hebreaj literoj. Ĉu ĉi tiuj literoj kaj desegnaĵoj estas la nomo de Dio kaj ĝuste legitaj povus havigi al leganto ĉiujn konojn aŭ eĉ la povon krei kiel Dio?



Stono trovita apud la tombejo de la fondito de la sekreta societo “La Dek du Apostoloj”. Bedaŭrinde ĝi estis detruata dum la 40-jardeko.

Krucvortenigmo

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2		■	■	■				
3								
4				■				
5							■	■
6			■	■			■	■
7						■	■	
8				■		■		

1. Grava movo de la terokrusto, ordinare okaziganta domfalojn.
2. Vokalo ■ Inverse kaj adjektive, nomo de la lingvo, en kiu estas skribitaj la kanonaj libroj de la Budhismo.
3. Inverse kaj akuzative, homo, kiu kutimas fari publikajn paroladojn.
- 4 Adverbo, signifanta *en alta grado*. ■ Sen la lasta vokalo, manĝebla, maraj molusko.
5. Inverse, fari pli ol sufiĉe. ■ Konsonanto.
6. Inverse kaj sen la lasta vokalo, kvanto da tempo, pasinta ekde la naskiĝo ■ Adjektive, Virino. ■ Vokalo.
7. Inverse, saturita gaso. ■ Inverse, persona pronomom.
8. Adverbo, uzata por altiri la rigardon sur iu aŭ ion. ■ Konsonanto. ■ Subjunkcio, signifanta *en la okazo, kiam*.

- A. Plurale, stato de iu kiu ricevas instigoj al ia malpermesata ago.
 B. Vokalo ■ Adverbe, parto de animala aŭ vegetaĵa korpo, adaptita por speciala vivofunkcio.
 C. Konsonanto. ■ Greka diino, edzino de Krono. ■ Sen la lasta vokalo, membro.
 Ĉ. Ĉina filozofio. ■ Inverse, io kion mi vidas antaŭ mi.
 D. Sen la lasta vokalo, mallonga muzika frazo de la orkestro, kiu sekvas aŭ antaŭiras pecon de kanto.
 E. Tia, ke ĝi facile kuntiriĝas, etendiĝas aŭ aliformiĝas.
 F. Sen la lasta vokalo, monato.
 G. Adverbe, facile uzebla pro bona adaptiĝo al sia destino-

Solve al la pasintnumera krucvortenigo.

D	O	L	M	E	N	O	J
E	L	■	A	N	A	S	O
L	I	B	R	O	J	■	L
I	V	■	O	R	L	A	J
K	O	R	■	D	■	R	A
T	L	U	M	I	L	P	■
O	E	L	O	■	A	S	O
■	O	P	R	E	S	A	S

Por kontakti kun la revuo, bv. uzi la
jenan adreson:

esperanto14@ono.com



HUMURO



“Aliaj “
Kristnaskoj



La numero 103-a de nia revuo aperos komence de la monato februaro 2017.
Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni
ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
 esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

- * Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net
- * Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



Vizitu la jutuban kanalon

Babelo Filmoj